

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 76-78 (361-363)

Abril-junho 1944

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54 sob.
Telefone, 42-4357
Rio de Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

DEKA BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 24an de majo, ĉe la salono de la Nacia Konsilantaro de Geografio, sub la prezido de S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, okazis la dua kunsido de la Organiza Komitato de la Dekaj Brazilaj Kongresoj de Esperanto. Post la legado kaj aprobo de la protokolo de la lasta kunsido la Prezidanto sciigis, ke Lia Ekscelenco D-ro Getúlio Vargas, Prezidanto de la Respubliko, akceptis esti la Alta Patrono de la Kongreso. Tiun sciigon la ĉeestantaro ricevis per varmaj aplaŭdoj.

La Ĝenerala Sekretario legis la liston de la gravaj personoj, kiuj jam akceptis esti membroj de la Honora kaj Protektanta Komitatoj, kies nomojn ni publikigas aliloke. Per aklamado oni elektis la nomojn de aliaj invitotaj personoj.

La Unua Sekretario, D-ro Mário Ritter Nunes, legis leteron de l' Prezidanto de la "Urugvaja Esperanto-Societo", per kiu li sciigas sian aliĝon al la Kongreso kaj proponas, ke la Organiza Komitato studu la eblon starigi en Rio de Janeiro Tutamerikan Kongreson de Esperanto. Ĉar tiu propono meritas specialan atenton, oni decidis prokrasti ĝian diskutadon.

Poste la Ĝenerala Sekretario, S-ro Ismael Gomes Braga, legis la Regulaĵojn de la Brazilaj Kongresoj kaj la Prezidanto nomis D-ro Carlos Domingues, trian vicprezidanton, por ke



Lia Ekscelenco D-ro Getúlio Vargas, Prezidanto de la Brazilia Respubliko kaj alta patrono de la Dekaj Brazilaj Kongresoj de Esperanto

li verku la internan regularon de la Organiza Komitato.

Laŭ propono de S-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E., oni decidis peti al S-ro Ministro por Eksterlandaj Aferoj, ke la Ministerio eldonu libron en Esperanto pri Santos Dumont, la patro de l' Aviado, pri kies

verko en portugala lingvo prenos sur sin Prof. Alexandre Brigole, kaj pri ties traduko zorgos B. L. E.

Oni decidis ankaŭ peti al S-ro Ministro por Publikaj Laboroj la eldonon de memoriga poŝtmarko, same kiel okazis dum la 9a Brazilaj Kongresoj de Esperanto, kaj specialan stampilon kun teksto en Esperanto por esti uzata dum la Dekaj Kongresoj.

La Prezidanto de B. L. E. sciigis la kunsidantojn, ke D-ro Georgino Avelino, Direktoro de Turismo en Rio de Janeiro, promesis organizi en portugala lingvo Gvidlibron de la Ĉefurbo de Brazilo, kiun iu ligano tradukos esperanten. Tiu ĉi verko baziĝos sur la Gvidlibro eldonita de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj okaze de la 9a Kongreso, kaj la broŝuro "Urbo Salvador", kiun eldonis la "Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko".

Oni kreis la kategorion de "Organizaĵoj kaj personoj simpatiantaj" por tiuj, kiuj ne partoprenante la kongresajn laborojn, tamen deziras elmontri sian simpatian al la Kongreso.

Fine F-ino Irani Baggi de Araújo, helpkasisto, legis bilancojn de la Kasisto, S-ro Délio Pereira de Souza, kiu ne povis ĉeesti la kunsidon. S-ro Prezidanto komisiis la Unuan Sekretarion por danki la Brazilan Spiritisman Federacion pro la ties valora monhelpo farita al la Kongreso.

Deka Brazila Kongreso de Esperanto

RIO DE JANEIRO — ABRIL DE 1945

ALTA PATRONO

S-ro D-ro Getúlio Vargas, Prezidanto de la Brazila Respubliko.

HONORA KOMITATO

S-ro D-ro Alexandre Marcondes Filho, Ministro por Justeco kaj Internaj Aferoj kaj por Laboro;

S-ro D-ro Gustavo Capanema, Ministro por Edukado kaj Saneco;

S-ro D-ro Henrique de Toledo Dodsworth, Ĉefurbestro de la Federacia Distrikto;

S-ro D. Jayme de Barros Câmara, Metropola Ĉefepiskopo;

S-ro D-ro João Marques dos Reis, Prezidanto de la Brazila Banko kaj eksministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj;

S-ro Generalo João de Mendonça Lima, Ministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj;

S-ro D-ro Osvaldo Aranha, Ministro por Eksterlandaj Aferoj;

S-ro D-ro Tadeu Skowronski, Ministro de Polujo.

PROTEKTANTA KOMITATO

S-ro D-ro Afonso Costa, Prez. de la Literatura Akademio de Rio de Janeiro;

S-ro Kapitano Amílcar Dutra de Menezes, Ĝenerala Direktoro de la Departamento de Gazetaro kaj Propagando;

S-ro Supera Ĵuĝisto A. Saboia Lima, Prez. de la Brazila Kultura Instituto;

S-ro D-ro Cristovam Leite de Castro, Ĝenerala Sek. de la Konsilantaro de Geografio;

S-ro Generalo Emilio F. de Souza Docca, Prez. de la Federacio de la Brazilaj Literaturaj Akademioj;

S-ro D-ro Fernando Antônio Raja Gabaglia, Direktoro de la Lernejo Petro II (Eksterulejo).

S-ro D-ro Herbert Moses, Prez. de la Brazila Gazetara Asocio;

S-ro João Daudt de Oliveira, Prez. de la Komerca Asocio de Rio Janeiro;

S-ro João Paim de Menezes Câmara, Prez. de la Asocio de Komercoficistoj de Rio de Janeiro;

S-ro Kolonelo Jonas Correia, Ĝenerala Sek. de Edukado kaj Kulturo de la Federacia Distrikto;

S-ro D-ro José Augusto Bezerra de Menezes, Prez. de la Brazila Asocio de Edukado;

S-ro D-ro Juvenal Martinho Nobre, Prez. de "Touring Clube do Brasil";

S-ro Majoro Landry Sales Gonçalves, Ĝenerala Direktoro de la Departamento de Poŝto kaj Telegrafo;

S-ro Prof. Pastro Leonel Franca, Dir. de la Katolikaj Fakultatoj.

S-ro D-ro Mário Teixeira de Freitas, Ĝen. Sek. de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj Prez. de la Interamerika Instituto de Statistiko;

S-ro Majoro Napoleão Alencastro Guimarães, Direktoro de la Centra Nacia Fervojo;

S-ro D-ro Raúl Leitão da Cunha, Rektoro de la Universitato de Rio de Janeiro;

S-ro Admiralo Raúl Tavares, Prez. de la Societo de Geografio kaj de la Brazila Societo de Filozofio.

10.º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

RIO DE JANEIRO — ABRIL DE 1945

RELAÇÃO DE CONGRESSISTAS

- 1 — Sr. Embaixador José Carlos de Macedo Soares
- 2 — Prof. Manoel B. Lourenço Filho
- 3 — D. Ana Amélia de Queiroz Carneiro de Mendonça
- 4 — Dr. Carlos Guimarães Domingues
- 5 — Sr. Ismael Gomes Braga
- 6 — Dr. Mário Ritter Nunes — Niterói. Estado do Rio de Janeiro
- 7 — Senhorita Maria Amaral Malheiro
- 8 — Senhorita Maria da Luz Costa
- 9 — Sr. Délio Pereira de Souza
- 10 — Senhorita Irani Baggi de Araújo
- 11 — Eng. Alberto Couto Fernandes
- 12 — Prof. João B. de Melo e Souza
- 13 — Sr. José Gomes Braga — Ubá. Minas Gerais
- 14 — Senhorita Hermínia Magalhães — Niterói. Est. do Rio de Janeiro
- 15 — Sr. Obdego Augusto — Barra Mansa. Est. do Rio de Janeiro
- 16 — Sr. Cap. Nikolao Ladany
- 17 — Sr. Francisco Cândido Xavier — Pedro Leopoldo. Minas Gerais
- 18 — Sr. Renato de Abreu
- 19 — Associação Esperantista do Meyer
- 20 — Sr. Augusto do Nascimento Siqueira — P. Alegre. Rio G. do Sul
- 21 — Senhorita Redenta Marinare
- 22 — Sr. Padre Mariano Plana — Ilha de Paquetá
- 23 — Instituto Brasileira de Geografia e Estatística
- 24 — Brazila Klúbo "Esperanto"
- 25 — Sr. Celso Boris Eston — Pelotas. Rio Grande do Sul
- 26 — Sr. Alando Carmo — Petrópolis. Estado do Rio de Janeiro
- 27 — Senhorita Lacyr Schettino — Barra Mansa. Estado do Rio
- 28 — Sr. Edmundo da Silveira Flores — Conquista. Minas Gerais
- 29 — Sr. Onésimo C. Faria
- 30 — Sr. Moacir S. Cunha — Recife. Pernambuco
- 31 — Sr. Dr. Eugénio de M. Paes Barreto — Recife. Pernambuco
- 32 — Sr. Prof. Teobaldo Recife
- 33 — Sr. Mozart Barbosa Cópio
- 34 — Sr. Armínio de Moraes
- 35 — Sr. José Gomes Braga (Dua)
- 36 — Sr. José Maria Duran — Buenos Aires. Argentina
- 37 — Sr. Oswaldo Arruda Stein — Cravinhos. São Paulo
- 38 — Pernambuka Esperanto-Asocio — Recife. Pernambuco
- 39 — Pernambuco Esperantista — Recife. Pernambuco
- 40 — Sr. Antônio Pinho — Canavieiras, Bahia
- 41 — Sr. Wilfred Maurice Goodes — Rosario. Argentina
- 42 — Sr. Agustín J. Palacios — Rosario. Argentina
- 43 — Asociación Esperantista de Rosario — Rosario. Argentina
- 44 — Associação Comercial do Pará — Belém. Pará
- 45 — Sr. Osmar Barreto Campos — Jaicós. Piauí
- 46 — Sr. Allan Kardec A. Costa — B. Horizonte. Minas Gerais
- 47 — Sr. Eng. Hernani M. Mendes

Rio de Janeiro, 30 de Junho de 1944



ALIGU AL LA DEKA BRAZILA
KONGRESO DE ESPERANTO

Brazila Ligo Esperantista

La 17an de Junio nunjara, ĉe la sidejo de la "Societo de Geografio de Rio de Janeiro", okazis ordinara ĝenerala kunsido de BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, sub la prezido de ĝia dumviva prezidanto, Ing. Alberto Couto Fernandes, kaj sekretariita de S-roj Prof. João B. de Melo e Souza, ĝenerala sekretario, kaj D-ro Mário Ritter Nunes, unua sekretario. Ĝin ĉeestis kvin estraranoj de B. L. E., la reprezentantoj de la jenaj filiitaj grupoj: Brazila Klubo "Esperanto", Associação Esperantista do Meyer, Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte, Pernambuka Esperanto-Asocio, Esperanta Grupo de Bahia, São Paulo Esperanta Klubo, Grupo Esperantista "F. V. Lorenz", Grupo Esperantista "Humberto de Campos" kaj Esperanto-Rondeto de São Sebastião, kaj de diversaj ligoj.

Post la legado de la protokolo de la antaŭa kunsido, kiu estas aprobita, la prez. faris resumon de la lastjara laboro de la Ligo kaj legis la bilancon de la kasisto kaj la aprobon de la kontoj prezentitaj al la Ministerio por Edukado rilataj al la ricevita subvencio.

Poste oni aprobis per aklamado la reelektadon de la membroj de la nuna estraro, nome: D-ro Carlos Domingues, vicprez., Prof. João B. de Melo e Souza, ĝen. sek., D-ro Mário Ritter Nunes, unua sek., F-ino Irani Baggi de Araújo, dua sek., kaj S-ro Odilo Pinto, kasisto.

Laŭ propono de S-ro Délio Pereira de Souza, oni decidis festi la 37an datrevenon de la fondo de B. L. E., kiu okazos la 21an de julio. La prez. elektis la aŭtoron de la propono kaj f-inojn Rosa Amaral Malheiro kaj Iracema Alvares Coelho por organizi la feston.

Estas decidite, laŭ propono de la prez., permesi la superan ekzamenon per korespondado al ĉiu, kiu, post aprobo en la elementa ekzameno, faris regulan superan kurson per korespondado.

La prez. parolis pri la laboroj de la O. K. de la Deka Kongreso, kiuj marŝas tre kontentige, kaj sciigis la ĉeestantaron pri la fondo de esperantista grupo en Petrópolis, kiu ricevis la saman nomon de tiu fondita en la jaro 1907a kaj vigle laboris dum la unuaj jaroj de la propagando de Esperanto en Brazilo, kies prez. estis D-ro Jácome Baggi de Araújo, la unua brazila esperantisto. Ĉar neniu petis la parolon, la prez. fermis la kunsidon.

10.^o BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Peco de kelkaj skribaĵoj senditaj de brazilaj eminentuloj, kiuj bonvolis akcepti esti membro de la 10a Brazila Kongreso de Esperanto al S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, Prezidanto da la Organiza Komitato:

El telegramo de D-ro Gustavo Capanema, Ministro por Edukado kaj Saneco: "Plaĉas al mi danki tiun Komitaton, per via altvalora pero, pro la elekto de mia nomo por la Honora Komitato de la Esperanta Kongreso, kies programo, je granda intereso por la Ministerio de Edukado, laŭ mia espero, plenumiĝos kun la plej granda sukceso".

El letero de Generalo João de Mendonça Lima, Ministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj: "Dankante la spontanee pruvon de konfido kaj estimo, mi esprimas la plej bonan deziron por la kompleta sukceso de la kongreso, kies organizantoj povos fidi je mia tuta ebla kunlaboro por la plenumo de tiel signifa programo de laboroj, notinde laŭ la kultura kaj amesprima vidpunkto".

El letero sendita de D-ro João Marques dos Reis, Prezidanto de la Brazila Banko kaj eksministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj: "Tre fierigas min la alta distingo, kiun faris al mi tiu klera komitato, al kies membroj bonvolu transdoni miajn plej sincerajn dankojn kaj ankaŭ la certecon pri tio, ke mi, en la sama malnova spirito jam elmontrita, ĉion faros por korespondi al la konfido, kiun ĝi havis al mi, kaj deziregas al la Kongreso la brilon kaj la sukceson, kiujn ĝia altega celo pravigas".

O RÁDIO E O 10.^o CONGRESSO

De acôrdo com a determinação do Coronel Jonas Correia, secretário-geral de Educação e Cultura da Prefeitura do Distrito Federal, a Rádio Difusora da Prefeitura, PRD-5, irradiará tôdas as quintas-feiras, às 19 horas, um programa dedicado ao 10.^o Congresso Brasileiro de Esperanto, em colaboração com a Comissão Organizadora. Pela mesma emissora serão irradiadas, em seus jornais diários, comunicações sôbre o andamento dos trabalhos preparatórios do Congresso.

Também a estação do Ministério da Educação, PRA-2, irradiará palestras e conferências sôbre o Esperanto e, especialmente, sôbre o Congresso.

A estação da Rádio Vera Cruz, PRE-2, que já irradiou a 1.^a Circular do Congresso, palestras, entrevistas e comunicações, continua à disposição da Comissão Organizadora.

SUPERA KURSO DE ESPERANTO

La 13an de majo Brazila Ligo Esperantista malfermis superan kurso de Esperanto por la akiro de la diplomo de "Profesoro aprobita". Okaze de la inaŭguro de tiu kurso faris brilan paroladon pri la "Strukturo de Esperanto" D-ro Luiz Pôrto Carreiro Neto, honora membro de B. L. E. kaj Direktoro de la Nacia Ĥemia Lernejo. Sidigis ĉe la prezidanteca tablo, krom la estraro de B. L. E., Prof. Lourenço Filho, direktoro de la Nacia Instituto de Pedagogiaj Studoj kaj Unua Vicprezidanto de la Organiza Komitato de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto, S-ro A. Caetano Coutinho kaj S-ro Délio Pereira de Souza, respektive, prez. de Brazila Klubo "Esperanto", kaj de Ass. Esp. do Meyer. Post la parolado, kiu estis varme aplaŭdita kaj kiun eldonos en speciala broŝureto la estraro de B. L. E., parolis S-roj Délio Pereira de Souza kaj Vergílio Guaianás de Souza.

La kurso, kiu funkcias ĉiusabate, de la 15a ĝis la 17a, estas gvidata de la jenaj profesoroj: S-ro A. Caetano Coutinho, D-ro Luiz Pôrto Carreiro Neto, D-ro Carlos Domingues, Prof. João B. de Melo e Souza, S-ro Ismael Gomes Braga kaj Ing. A. Couto Fernandes.

Enskribiĝis en la kurson F-inoj Irani Baggi de Araújo, Maria Amaral Malheiro, Rosa Amaral Malheiro, Débora Amaral Malheiro, Iracema Alvares Coelho, Rosa Cruz Ferreira kaj Arlette Menezes, kaj S-roj Felisberto Antônio Fernandes, Nelson Pereira de Souza, Octaviano da Silva Lopes, kaj Haroldo Leite Pinto.

Congresso Esperantista

"Emprestando, há muito, sua solidariedade aos movimentos em prol da expansão do Esperanto como língua auxiliar, para maior facilidade do entendimento entre os povos, o Conselho não podia deixar de ver senão com interêsse e simpatia a realização, em 1944, do Décimo Congresso Brasileiro de Esperanto, promovido pela Liga Esperantista Brasileira, conforme deliberação tomada em outubro de 1943.

Em obediência à Resolução n.^o 82, de 18 de julho de 1938, da Assembléia Geral do Conselho, a qual adotou o idioma esperantista como língua auxiliar nas atividades e publicações da entidade, uma sinopse estatística, aparecida em 1938, e outros trabalhos, posteriormente, foram editados em Esperanto, tendo sido, ainda, em virtude da Resolução n.^o 128, de 19 de julho

Esperanto kaj edukado

El artikolo verkita de D-ro Mário Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la "Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistiko" kaj prezidanto de la "Interamerika Instituto de Statistiko", aperinta en la ĵurnalo "Folha Carioca", el Rio de Janeiro, Ĉefurbo de Brazilo, ni elĉerpis kaj tradukis la jenajn periodojn:

"Tamen al tiu movado de intima kunfratiĝo ĉe la internacia socio mankas la plej altgrada instrumento, tiu de la propra pensesperimo. Idiomo, kiun ĉiuj homoj povus facile lerni kaj utiligi en la rilatoj de popolo al popolo, sed sen la risko sin senti, pro tio, vunditaj nationalistaj ofendiĝemoj aŭ sin kaŝi superregaj fantazioj.

Tiun aspiro, la plej noblan el ĉiuj, plenumis je plenege kaj inteligenta maniero tiu lerte eltrovita helplingvo, tiu belsona, eleganta, riĉa kaj tre facila universala lingvo -- Esperanto, la admirinda kreitaĵo de Zamenhof.

Oni ĝeneraligu la uzon de tiu admirinda idiomo, universaligu la utiligon de Esperanto, kaj ĉiuj plej belaj idealoj de paco, kooperado kaj frateco inter la homoj rapide triumfos.

Sed la edukada afero, precipe, estos la granda profitinto de la triumfo de Esperanto.

Ne parolante pri kiom gajnos la homaro je morala perfektigo dank' al la frateca spirito, kiu rapide disvolviĝos kun la praktiko de la inter-komunikigo inter la ŝtatoj de ĉiuj patrujoj; ne parolante pri la estiĝo de idealismo, pri la noblaj fluoj de penso kaj emo-

de 1939, inkludite o estudo daquele idioma no programa do Curso de Aperfeiçoamento mantido pelo Conselho.

As relações entre a Estatística Brasileira e o Esperanto remontam, aliás, à iniciativa de Bulhões Carvalho, então Diretor Geral de Estatística, vertendo para o Esperanto a introdução e os cabeçalhos de todos os quadros da primeira publicação organizada no Brasil com feição de repertório de estatística geral — O *Boletim Comemorativo da Exposição de 1908*.

Justa, portanto, a expectativa simpática com que é aguardado, no seio do Conselho, o próximo Congresso Esperantista".

(Do "relatório de 1943", apresentado ao Exmo. Sr. Dr. Getúlio Vargas, pelo Sr. Embaixador José Carlos de Macedo Soares, Presidente do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística — págs. 103 a 104).

LA DEPARTEMENTO DE GAZETARO KAJ PROPAGANDO KAJ ESPERANTO

Dum unu el la kunsidoj de la Organiza Komitato de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto oni decidis per akklamado elekti S-ron Kapitanon Amilcar Dutra de Menezes, Ĝenerala Direktoro de la Departemento de Gazetaro kaj Propagando (DIP), por esti membro de la Protektanta Komitato de la Kongreso.

Invitite de S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, prez. de la O. K., S-ro A. Couto Fernandes, Prez. de B. L. E., vizitis S-ron Kap. Dutra de Menezes por lin sciigi pri tiu decido kaj kun li longe interparoladis pri la Kongreso. La Direktoro de DIP promesis fari fortan propagandon de la Kongreso kaj eldonigi, interkonsente kun BLE, ilustritan libron pri Brazilo kun teksto en Esperanto.

Kelkajn tagojn poste la ĵurnalistino Carmen Lemoine, el la Nacia Agentejo, fako de DIP, vizitis la sidejon de BLE kaj havis kun ties Prez. intervjuon, kiu aperis sur la ĵurnalo "Gazeta de Notícias" kun ilia fotografiaĵo. La intervjuon transskribis "O Estado de São Paulo" kaj "Jornal de Petrópolis" kaj disradiis la stacio de Rádio Vera Cruz.

cio, kiujn tiu intensa internacia korespondado povas okazigi kaj certe okazigos, — ni imagu la mirigan povon por disvastigi instruojn, aspirojn, incitojn, fine ĉiujn faktorojn de mensa kaj morala perfektigo inter la homoj, kiun povos havi la edukadaj bataloj disŝutitaj en Esperanto, per la libroj, per la radio, per la sona filmo, per la disko, kiam la tuta homaro estos atingbla al la esprimo tra la nobla idiomo de espero kaj frateco!...

Kian povon de emocio havas tiu ĉi alta penso: ke ia tago povos veni, nepre venos, — kaj eble jam ne estas malproksima —, en kiu la voĉoj de nobla komando aŭ de grandanima konsilo, stariĝintaj el la sino de la homaro, povos rebrili sur ĉiuj koroj kaj konsciencoj!... Kaj kiom tiu probable devas esti danko al la idealistoj, kiuj aspiras tiun Oran Aĝon, tiun epokon de frateco kaj paco inter ĉiuj nacioj!

Kio estas do necesa? Tio, kio estas necesa, tio, kio estas nepre necesa, tio, kio estas urĝa, estas, ke ĉiuj klopodoj unuigu, por ke Esperanto, kiel eble plej baldaŭ, konkeru la plenecon de sia admirinda efikeco. Kaj por tio du aferoj estas konsilindaj: ke ĉiu el ni,

Spiritismo kaj Esperanto

La tuta laborado de la BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO por Esperanto dependis nur de persona simpatio de ties Estraro, ĉar la Statuto de la Federacio nenion rajtigis pri tio. Tiu Statuto estis eĉ pli malnova ol Esperanto kaj neniel menciis nian lingvon.

Sed la 4an de junio nunjara, post longa diskutado, oni modernigis tiun Regularon kaj al la 67a paragrafo estis aldonita la jeno:

"Tial ke la Federacio uzas Esperanton en la diskonigo de siaj pridoktrinaj verkoj, ties Librovendejo tenados la servon de disvastigo de tiu idiomo."

La Ĝenerala Kunsido multe diskutis aliajn ŝanĝojn en la Statuto, kaj fine aprobis ĉion per 136 voĉoj kontraŭ nur ok. Sed la malaprobintoj neniel tuŝis la aferon de Esperanto. Do la aldono pri kaj por Esperanto estis unuanime aprobata.

Ĝi taksas tre grava tiun venkon, kiun oni ŝuldas, precipe, al nia fervorega samideano S-ro Ismael Gomes Braga, ĉar de nun la librovendejo eldonos laŭleĝe esperantajn lernolibrojn kaj post kelkaj jaroj havos gravan kapitalon en libroj.

Niajn korajn gratulojn al nia kara kunbatalanto!

O Esperanto na Palestina

Recebemos da "Palestina Esperanto-Ligo", P. O. B. 320. Jerusalém, Palestina, uma circular comunicando que de 10 e 12 de abril do corrente ano teria lugar em Jerusalém o 6.º Congresso Esperantista da Palestina, sob a presidência do vice-governador da cidade, Sr. Daniel Auster. A julgar pelas adesões até então recebidas pela Comissão Organizadora, o congresso deve ter tido uma enorme concorrência.

Agradecendo a participação desejamos que o grande certame esperantistas do Oriente Próximo tenha tido um grande êxito.

unue, rapidiĝu ricevi la plezuron lerni Esperanton, kaj, poste faru por ĝi la plej grandan propagandon ĉe la kampo de sia aktiveco kaj ĉe sia konataro.

Per tiu tiel simpla kaj tiel facila klopodo, ni laborados por la formado de tiu homa super-sampenso, kiu, kunordigante ĉe la fruktodona laboro la naciajn aktivecojn, preparos la homaron por la mirakloj, kiujn kapablas, kiam triumfinta, la bonvolo de la homoj".

ARGENTINA ESPERANTO KATOLIKA ASOCIO

La "Argentina Esperantista Katolika Asocio", kiu nun brile funkcias en Buenos Aires, estas frukto de semo jetita de D-ro J. A. Quiña Gonzalez meze de la argentina katolika esperantistaro en julio 1939a, pere de la grava katolika ĵurnalo EL PUEBLO, kaj vigla laboro dum kelkaj jaroj. La Asocio, fondita en la lasta jaro, komencis sian agadon per Paskmeso farita la 25an de aprilo. Dum tiu ĉi meso kaj dum aliaj, kiuj poste okazis, la asesoro de la Asocio predikis en Esperanto kaj en tiu ĉi lingvo estis kantataj religiaj kantoj. La Asocio konsistas nun el 60 geanoj kaj en sia sidejo, sur la *strato Formosa 240* — Piso 3.^o Dep. P., okazas Ĉe-kurso gvidata de D-ro Quiña Gonzales. Li kaj la asocianoj interrilatigas kun katolikaj esperantistoj loĝantaj en Ĉilo, Brazilo, Paragvajo, Urugvajo kaj Ekvatoro.

La "Arta Rondo Esperanto" prezentis lastjare ok koncertojn kun kantoj kaj deklamadoj en Esperanto.

Al D-ro Quiña Gonzales ni sendas varmajn gratulojn pri lia inteligenta propagando de nia kara lingvo ĉe la katolika medio.

REGULAMENTO DOS EXAMES DE ESPERANTO

Por ocasião da sessão de Assembléia Geral da "Liga Esperantista Brasileira", realizada no dia 17 de Junho, foi aprovada o acréscimo do seguinte trecho ao Regulamento dos Exames de Esperanto:

"Nos lugares onde não houve *profesoro aprobata* será permitido o exame superior por correspondência para a obtenção do respectivo diploma às pessoas que tenham sido aprovadas no exame elementar e feito com regularidade o curso superior por correspondência ministrado pela Liga Esperantista Brasileira.

O exame constará de prova escrita compreendendo tradução para o português de um trecho de 20 linhas da *Fundamenta Krestomatio*, ou de outro livro com texto escrito por Zamenhof; tradução para o Esperanto de um trecho de 12 a 15 linhas de boa prosa brasileira e, finalmente, dissertação de um ponto sobre a gramática de Esperanto. Os textos dessa prova serão revistos por dois professores designados pelo presidente da Liga Esperantista Brasileira. A taxa de exame será de dez cruzeiros, paga no ato da inscrição. Não haverá graus de aprovação: o candidato será, ou não, aprovado."

BRAZILU KAJ LA MILITO



Iu el la fotografajoj faritaj dum festeno dediĉita de la kulturaj kaj sociaj Asocioj el Rio de Janeiro al la flegistinoj, kiuj akompanos la unuan Brazilan Ekspedician Korpuson. Dekstre, sur la dua kaj la tria sidlokoj, estas S-roj Ing. A. Couto Fernandes Respublika

kaj Mário de Souza, reprezentantoj, respektive, de BLE kaj de la Geografia Societo. Maldekstre vidigas kelkaj aninoj de la Brazila Legio por Helpo al la familioj de la alĉokitaj soldatoj, kies prezidantino estas S-ino Darcy Vargas, edzino de la Brazila Prezidanto.

HUNGARA HEROLDO

Veran plezuron faris al ni la ricevo de iu numero de "Hungara Heroldo", oficiala organo de la "Hungara Esperanto Federacio", kies adreso estas: *Kender-u 39. Budapeŝt, Hungarujo.* Tiu ĉi numero, kiu rilatas al la monato Decembro 1943a, estas la sola, kiun ni ricevas de post la milito. Ĝi alvenis al niaj manoj pere de Portugalujo, kie oni ĝin metis en la poŝtkeston. La direktoro de la Federacio estas S-ro Jozefo Mihalik kaj inter ĝiaj kunlaborantoj estas la fama verkisto Julio Baghy. Sur la unua paĝo de la revuo oni legas la jenajn vortojn: "Karaj samideanoj! La Hungara Esperanta Federacio deziras ke en jaro 1944a jam ĉiu homo revenu en sian hejmon, ke la nacioj komencu renovigi siajn landojn kaj venu periodo longa, eĉ eterne daŭranta, en kiu la homaro vivu diligente laborante homan vivon!..." Tio estas ankaŭ la forta deziro de la tutmonda esperantistaro.

La revuo enhavas grandan nombron da ilustraĵoj pri la skolta vivo kaj interese artikolon titolitan "La hungara skoltismo" kaj ankaŭ informojn pri la Esperanto-movado en Hungarujo, Danujo kaj Svisujo. Ni esperas, ke post la milito ni havos la plezuron ricevi la antaŭajn nericevitajn numerojn de tiu interesa revuo.

Kiel aldono al "Hungara Heroldo" alvenis al ni la n-ro 3a de "Revuo — Bulteno pri la Esperanto movado en Bulgarujo." Tio pravas, ke, kvankam

LA 57.^o DATREVENO DE ESIE ANTO

Je la 14a de julio 1887a aperis en la librovendejoj la "Unua Libro de la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto". Tiu apero estas la naskiĝo de la lingvo kaj de nia movado. La 14an de julio 1937a ĉiuj esperantistoj en la mondo festis la Oran Jubileon de Esperanto kaj en Brazilo, pro decido de la tiama Ministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj, D-ro João Marques dos Reis, oni memorigis tiun tagon per la apero de speciala poŝtmarko, kiun la filatelistoj zorge konservas por la estontaj tempoj.

Nun, en la kvina jaro de furioza mondmilito, la esperantistoj rigardas kun ĝojo la pasintajn penojn kaj laborojn, ĉar ili konstatas, ke nia movado neniam plu povos pere, tial ke eĉ dum mondmilito ĝi prosperas, konservas la entuziasmon en la koroj de ĉiuj progresemaj homoj tra la mondo kaj varbas novajn fervorulojn por nia paca batalo.

Certe la estontaj generacioj ne povos kompreni, kiom da laboro kaj sufero kostis al la unuaj esperantistoj la venko de tiu granda ideo, en tempo malfavora, kiam neniu kredis je la venko de lingvo artefarita kaj malmultaj komprenis la moralan signifon de nia movado. Nun ĉio fariĝas facila, ĉar la venko estas videbla kaj la utilo de la lingvo estas klara.

malforte, tute ne ĉesis la propagando de Esperanto en tiu ĉi lando.

O EMBAIXADOR SOUZA DANTAS E O ESPERANTO

É bem de supor que o 10.º Congresso Brasileiro de Esperanto, a realizar-se aqui no ano vindouro, terá brilho e êxito iguais, senão superiores aos que lograram as anteriores reuniões idênticas.

Para o supor, concorrem várias razões palpáveis.

A primeira está no empenho do Sr. Embaixador José Carlos de Macedo Soares, presidente da comissão organizadora do certame, bem como dos seus colegas na mesma comissão, em que, da dita reunião resultem coisas práticas e úteis, a prol do desejo, que é hoje universal, duma língua segunda que atue no mundo e entre todas as nações, como um instrumento eficiente de bom entendimento entre os homens e de concórdia internacional.

Outra, a quantidade de homens, por diversos títulos eminentes, que já aderiram ao Congresso e passaram a fazer parte, uns da sua comissão de honra, e outros da sua comissão patrocinadora, não sendo escassa a conta de associações culturais e de diversos outros gêneros, que já a prestigiavam com o apoio que já lhe dão.

E há ainda circunstância de outra ordem, que faz com que até mesmo os que não são esperantistas nem esperantófilos olhem com simpatia para o certame em aprêço e para o idioma que lhe é objeto: a guerra, que talvez não houvesse deflagrado, se todas as gentes, falando uma mesma língua, melhor e mais cordialmente se pudessem entender.

Souza Dantas, o insigne diplomata a quem deve o Brasil tantos serviços, e a quem o Rio de Janeiro recebe, agora, com justas mostras de admiração e aprêço após as arbitrariedades e violências de que, por ser brasileiro, foi alvo, e com os quais arcou com uma bravura moral que ainda mais e enobrece, já, com a sua longa experiência dos problemas internacionais, falou do Esperanto com uma concisão e uma eloquência que bastam a converter os maiores adversários da língua-auxiliar.

Ouvindo, há tempo, por um jornalista de Paris, onde era então nosso Embaixador, assim se manifestou ele:

"Quer o senhor a minha opinião sobre o Esperanto? Já sabe que sou fervoroso pacifista e como tal conheço muito bem o valor e a necessidade de um instrumento linguístico de comunicação para as relações entre os povos. Aproximar os corações de homens é tarefa mais fácil para uma língua internacional, e, por isso o Esperanto poderá prestar grandes serviços à humanidade."

É, como vêem os leitores, um depoimento tão oportuno quanto valioso, de um brasileiro ilustre, conhecedor profundo das coisas internacionais, velho diplomata na posse do "saber de experiência feito", e que, não sendo um esperantista propriamente dito, percebe bem as grandes vantagens do Esperanto. — D. B. — Domingos Barbosa.

(Do "Jornal do Brasil", de 18 de Maio de 1944).

No dia da chegada ao Rio de Janeiro do Embaixador Souza Dantas e presidente da B. L. E. enviou-lhe um telegrama de boas-vindas, o qual foi gentilmente respondido.

Uruguai

"La Tribuna Popular" publicou em espanhol, sob o título "El Esperanto y la Educacion", o artigo do Dr. Mário Teixeira de Freitas, que apareceu em "Folha Carioca".

A tradução foi feita pelo Sr. Pedro Casas, delegado de I. E. L. e presidente da Asociación Esperantista del Uruguay, que manifestou sua adesão ao 10.º Congresso Brasileiro de Esperanto e propôs que ele se transformasse em Congresso Pan-Americano.

O ESPERANTO NA SUIÇA

O INSTITUTO BRASILEIRO DE GEOGRAFIA E ESTATÍSTICA e a LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA, receberam do "Serviço de Publicidade da Sociedade Suíça de Esperanto", cujo presidente é o Sr. Hans Unger, as seguintes comunicações:

"De uma entrevista fornecida pelo Sr. Hans Buchill, diretor do tráfego da cidade de Berna, a um jornalista, transcrevemos as seguintes frases dignas de nota:

"Na propaganda suíça feita no Exterior debate-se agora, em toda parte, o planejamento para e após-guerra. O fato de ter sido proferida nesses debates a palavra "Esperanto", é, ao meu ver, prova de perspicácia louvável.

Na qualidade de diretor do tráfego de Berna fui chamado para a cadeira de presidente da Comissão organizadora do Congresso Esperantista Mundial, que se realizou, em 1939, na cidade de Berna. Disso resultou para mim o dever evidente de me inteirar da questão das línguas mundiais. Então até aprendi o "ESPERANTO", sabendo conversar fluentemente, depois de poucos meses, com as centenas de congressistas, vindos de quase todos os Estados do mundo. Esse fato provou para mim a perfeita utilidade do Esperanto, estando firmemente convencido de que essa língua auxiliar neutra é idônea para lançar pontes sobre muitos abismos e fossos e para aplanar os caminhos para o entendimento mundial, porque eu mesmo experimentei esse fato no Congresso Mundial de Berna. O que o Esperanto pode significar nos campos do comércio e tráfego, assim como na vida cultural internacional, é patente, sendo que já hoje desempenha um papel considerável, pois já está bastante espalhado em todos os continentes e países e fazia parte, antes da guerra, do programa de ensino oficial de muitas escolas em diversos Estados.

Também a Suíça o Esperanto já prestou mais do que um serviço útil. Estou firmemente convencido de que comércio, indústria e turismo do nosso país podem tirar, depois da guerra, muitos proveitos de um reclame mundial do Esperanto, organizado com boa técnica".

"No que se refere à reforma planejada do ensino na Inglaterra entregou-se há pouco ao governo, na qual se solicita ao Ministério da Educação a introdução no

"Gazeta Judiciária"

Tiu ĉi gazeto, kiu cirkulas ĉe la jur-medio, havas kiel Direktoron kaj posedanton D-ron Rolando Pedreira kaj estas presata ĉe la presejo de Fratoj Pongetti. Li kaj ĝia Vicedirektoro D-ro Othon Costa, kiu estas ankaŭ direktoro de "Centro Carioca", ĉiam elmontris simpatian al Esperanto. Tial ili publikigis sur tiu gazeto longan intervjuon, kiun ili havis kun S-ro Ing. A. Couto Fernandes, kaj kiu okupis 4 kolonojn de tiu periodaĵo. La Ligo sendis kelkajn dekojn de tiu numero al la gravaj enlandaĵ kaj eksterlandaj asocioj, gazetoj kaj personoj, kiuj sin priokupas pri Esperanto. La gazetoj "Jornal de Petrópolis", el Petrópolis, Stato Rio de Janeiro; kaj "Ponche Verde", el D. Pedrito, Stato Rio Grande do Sul, transkribis la tutan intervjuon kaj la stacio de Rádio Vera Cruz ĝin disradiis.


D-ro Mário Ritter Nunes, unua sek. de B. L. E., sendis al D-ro Rolando Pedreira la jenan telegramon, kiu aperis sur la sekvinta numero de tiu gazeto: "Brazila Ligo Esperantista eksciĝinte pri la intervjuo kun sia prezidanto, S-ro Couto Fernandes, aperinta en tiu prestiĝhava organo, dankas tiun valoran kooperadon ĉe la alproksimiĝo de la popoloj kaj esperas, ke ĝi daŭrigos la ricevon de efika kaj brila apogo al la propagando de Esperanto".

Se la apero de tiu intervjuo ne estus kaŭzinta la menciitan efikon, sufiĉus por kontentigi nin la publikigo, en la sekvinta numero, de interesa artikolo de d-ro Raul Pederneiras, jur-profesoro kaj eksprez, de la "Brazila Gazetara Asocio", apoganta la ideojn montritajn de la intervjuo. Li rememorigis laboristan feston, okazintan antaŭ multaj jaroj, kiun li ĉestis en kompanio de S-roj Couto Fernandes kaj Carlos Domingues. Tiam li vive surprizigis aŭdante laboristineton senĝene interparolanta en Esperanto kun itala kaj rusa esperantistoj. Li diris: "La supereco de vivanta lingvo, oficiale internacia, direktiĝas ankoraŭ pli al la invado en la civilan kampon".

programa de ensino da língua auxiliar internacional Esperanto.

Poder-se-á considerar notável o fato de figurarem entre os peticionários também 2.600 professores. Também pertencem ao número dos que recomendam o Esperanto o conhecido delegado britânico à Liga das Nações Lord Robert Cecil e o linguista de Oxford, Sr. Gilbert Murray, cujo nome, aliás, está intimamente ligado à Comissão Internacional de Cooperação Intelectual".

ESPERANTISTA PARO



GESINJOROJ GEORGE ALAN CONNOR

Sinjoro George Alan Connor kaj Fraŭlino Doris Tappan, kiuj nin vizitis en la jaro 1941a kaj lasis tie ĉi multajn amikojn, anoncis al ni sian edziĝon, okazintan je la 29a de Aŭgusto 1943a, en Portland, Oregon.

Skribante al la estraro de BLE li diris "Mi gajnis tutan feliĉon kaj Esperanto pli fortan paron por efika instruado kaj propagando de nia interlingvo. Al ĉiuj karaj amikoj en Brazilo ni sendas nian tutkoran saluton".

En la nomo de la brazila esperan-

tistaro la prez. de BLE sendas koran dankon pro la sciigo kaj deziras al ili la plej bonajn feliĉojn. Ni esperas, ke ili profitos la daton de nia Deko Kongreso por denove viziti nin.

"O Brasil Esperantista", kiel pruvon de sia forta simpatio al tiu feliĉa paro, aperigas ties fotografajon.

S-ro G. Connor estas nun la redaktoro de la grava revuo "Amerika Esperantisto", kies lasta numero tre plezurigis nin. S-ino Doris F. Connor estas unu el liaj helpredaktoroj.

tico, que, fundados na prezação de sábios princípios e na defesa de doutrinas firmadas por eminentes estadistas, criaram para os nossos países o lugar de destaque que lhes compete no concerto universal.

Na obra dos esperantistas há um idealismo que nunca esmorece, senão desafia a própria conflagração atual, prevalecendo no esforço generoso de realizar o sonho de um novo humanismo, pela aceitação geral de um idioma internacional comum, secundário e auxiliar das línguas nacionais.

Com êle o nosso século, que tem visto apregoarem-se tanto doutrinas belicosas contrárias à felicidade e ao bem-estar, porque — dizem os arautos da guerra, partidários do Darwinismo social, — tais promessas reduziriam o homem ao nível dos animais inferiores e degradaria a humanidade à existência puramente física, poderá talvez encaminhar a realização da profecia bíblica: as espadas se converterem em instrumentos de trabalho num mundo de paz completa entre os homens".

A PROPAGANDA DO ESPERANTO

Entre os idiomas de formação artificial que têm surgido — e não são poucos — aspirando à glória, muito bela mas principalmente muito útil, de servir para a exteriorização dos sentimentos e das idéias de todos os povos, nenhum progrediu mais do que o elaborado por Zamenhof, na direção de tão alto objetivo.

A realidade de semelhante afirmação é, porém, manifesta, visto como não chegam ainda a constituir legiões os verdadeiros esperantistas, aqueles que, além de entusiastas, são realmente conhecedores e maneja-dores da nova língua, mesmo nos países onde ela encontrou melhor acolhimento, devido ao avanço da cultura e à vibração do idealismo.

É um ideal de universalização que se colima. Ora, não é preciso dizer-se mais para que fiquem na maior evidência os enormes obstáculos que se lhe defrontam na prática.

Muito o favorecerão, não se discute, os comícios no gênero do anunciado entre nós para breve, porquanto representam outros tantos ensejos de larga e forte repercussão, que lhe são oferecidos.

Aquilo, entretanto, que de melhor, de mais positivo e eficiente pode ser feito em tais congressos, é a planificação e, se possível, a organização da propaganda contínua do esperanto em todas as classes. Falte-lhe isso, que é *conditio sine qua non* da universalização desejada, e ele não passará de uma curiosidade com que uma diminuta elite intelectual irá ornando parte de sua existência.

O esperanto reúne os predicados que Descartes considerava imprescindíveis à linguagem capaz de ser, algum dia, comum a todos os homens. Na verdade ela é "fort aysée à apprendre, à prononcer et à écrire, et, ce qui est le principal, ayde-roit au jugement".

Leia-se aí, nesse francês arcaico, em vez de "julgamento", raciocínio. É curial que se preste de maneira extraordinária para o jogo das idéias uma língua artificial, é certo, mas a cuja ordenação foi a razão mesma que presidiu sempre.

Tudo a torna de assimilação e manejo fáceis. É apenas de pequenos esforços

DIA PANAMERICANO

